
# Aŭstraliaj Esperantistoj



## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 15/12/2022 Sescentdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**


Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 684,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **151,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **141,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **93,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )




## Esperanta Retradio

Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon



**Kiel mi spertis esperantistan turismon** 7-a de decembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*

**EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ DE LA "ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**N.ro 15 de "Por Komencantoj".**

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la subfrazo de la kombinita propozicio (= frazo) " En la dek minutoj, DUM KIUJ la manĝema knabo manĝis la kukon rapide, li sukcesis manĝi la tutan kukon kun gusto", "la knabo" estas la gramatika subjekto. Kio estas en la subfrazo la gramatika objekto, kaj kia frazparto estas "DUM KIUJ"?

2). En la ĉeffrazo de la kombinita frazo en N.ro 1), A), kio estas la gramatika objekto, B). kia frazparto estas "EN LA DEK MINUTOJ DUM KIUJ LA MANĜEMA KNABO MANĜIS LA KUKON RAPIDE", kaj C). kiaj frazpartoj estas "sukcesis manĝi" kaj "la tutan kukon" kaj "kun gusto"?

3). En la frazo "Dum dek jaroj li ĉiam estifinnas fidela amiko, kiun mi ĉiam povis fidi" kiu vorto estas la antecedento kaj kiu vorto estas la rilata pronomo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 613.

*Marcel Leereveld.* Sendita per peto de Marcel



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno.
La 16a de decembro estis la tria sabato. Venu *Roger Springer*

# La Esperanto-Federacio de Viktorio

invitas vin al sia "Zamenhofa Festo"

7.00 ptm, Dimanĉon la 18an de Decembro 2022

ĉe la "Melbourne Unitarian Peace Memorial Church"

110 Grey Street, East Melbourne.

Ĝuu vesperon de muziko, kantoj, paroladoj, kaj aliaj distraĵoj

Bonvolu alporti pladon

Ni esperas ke vi celebros tiun feston kun ni.

★★★★

"Nek homon, nek homamason, nek nacion oni povas fidi, ke ili agis homece aŭ prudente pensas sub la influo de granda timo." —*Bertrand Russel*.

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). La gramatika objekto en la subfrazo estas “la kukon”, kaj “DUM KIUJ” estas la rilata pronomo.

2). A). La gramatika objekto de la ĉeffrazo estas “la kukon”, kaj B). Tiu tuta frazparto estas adjekto, kaj C). “sukcesis manĝi” estas la predikato (verboj), “la tutan kukon” estas la objekto, kaj “kun gusto” estas adjekto.

3). La antecedento estas “amiko” kaj la rilata pronomo estas “kiun”.

*Marcel Leereveld.*

Kara Roger,

## La plej aĝaj viroj en Aŭstralio.

Pasintsemajne mi plurfoje provis skribi al vi, sed ŝajne via retadreso ofte ne funkcias. Nun eble interesos vin nova informo. Marcel Leereveld estas en la listo de la plej aĝaj viroj en Aŭstralio. Vidu https://gerontology.fandom.com/wiki/List_of_oldest_living_people_in_Australia



Amike, *Nicole Else*



Viro eniras bestkuracistejon kun sia hundo Samuelo.


“Sinjoro bestkuracisto, Samuelo treege ŝatas, eĉ ŝategas ĉasi homojn sur ĉevaldorsoj”!



La bestkuracisto: “Provu forpreni de li la ĉevalon!’ *Bob Felby*



## La Okcidento kaj la Plimulta Mondo





# Skribu pri via klubo



# Masakro en Demokratia Respubliko de Kongolando

Gekaraj, Bv alklaki: (massacre de Kiŝiŝe en DRK), ĉe Google

Pli ol 132 homoj mortigitaj, 50 infanoj! Okazis je 29-a kaj 30-a de novembro en Norda Kivuo.
Ni ploregas tiun senfinan teruran kruelaĵon. Pli ol 300 personoj atingis nian preĝejon denove ,15 sengepatraj infanoj. Ĉi-foje ni hontas helpkrii. Ili nepre bezonas vestaĵojn, ŝuojn, manĝaĵojn, litukojn kaj plastajn ŝirmilojn('' bâches'' en la franca lingvo ) por konstrui provizorajn domojn kiel kutime por rifuĝintoj.

Nia loka preĝejo ĵus registris forlokitojn de la masakro okazinta en vilaĝo KIŜIŜE en la provinco Norda-Kivuo, pli precize je 70 kilometroj de la urbo Goma.

Ili alvenis sen domaĵoj, ĉio forbruligitaj kaj ŝtelitaj( vestaĵoj, ŝuoj, ladboteloj, matracoj kaj aliaj).

Ni luktas penege por povi ilin nutri, vesti kaj loĝigi.

Ni petas internaciajn organizaĵojn helpon pri toltukoj (500) por konstrui provizorajn lignajn domojn por batali kontraŭ la pluvo, kontraŭ malario kaj moskitoj kaj aliaj katastrofoj ĉar nun estas pluva sezono.

Mi pensas, ke havi pacon en Demokratia Respubliko de Kongolando estus malofta aĵo kiun ni ne havas dum 25 jaroj. Sed tion ni bezonas por povi rekonstrui nian landon, doni al niaj infanoj la fundamentan estontecon, alfronti militon, eduki niajn infanojn en akcepteblaj kondiĉoj, por ke niaj infanoj ne nur estu edukitaj, sed hodiaŭ ni havas la subnutradon simple,ĉar homoj ne povas kultivi, ne povas labori normale pro ribelantoj ĉie en la regiono kaj en la kampoj. Virinoj estas perforte seksumitaj en kampoj, mortigitaj, ktp. Nia revo estas paco, edukado per de nia lingvo Esperanto neŭtrala.

Antaŭ ĉio, estas virinoj kiuj estas viktimoj de seksa perforto, kiujn ni ne nur traktas kaj transportas, sed ankaŭ kiujn ni nutras kaj al kiuj ni provizas higienajn ilarojn, medikamentojn sed tio ne sufiĉas ĉar nia preĝejo estas senprofitdona Organizaĵo.

Estas ĉiuj pacientoj kun AIDOSO , kiuj estas traktataj senpage en nia malsanulejo konstruita en Kiringje helpe de norvegaj, finnaj, svedaj kaj usonaj esperantistoj. Ĉiuj infanoj, kiuj suferas kaj estas subnutrataj, estas zorgataj senpage, sed nia preĝejo kaj komunumo dronas, kio nun superas nian eblecon.

Hodiaŭ, kio okazas en Kongolando, oni havas la impreson, ke la internacia komunumo lasas aferojn okazi, lasas Rvandon fari kruelaĵojn al nia popolo . Sed bedaŭrinde la historio ripetas sin. La internacia komunumo faras la saman eraron, kiun ĝi faris en Rvando dum la sanga milito inter tutsioj kaj hutuoj etnoj, postlasante la genocidon de la tucioj. Hodiaŭ la rvandanoj buĉas la kongolanojn. Temas pri krimoj kontraŭ la homaro, militkrimoj, kiuj eĉ povas esti krimoj de genocido, kaj la internacia komunumo fermas la okulojn kiel ĝi fermis la okulojn en 1994-aj jaroj. Kian utilon havos la viktimoj, se post dek jaroj la internacia komunumo vekiĝos por realigi siajn erarojn. ? Ni volas agon nun, la milito aĉas!

Bonvolu pligrandigi ĉi tiun peton al aliaj organizaĵoj kaj bonvoluloj por helpi niajn fratojn en malfacilaĵoj.
Ni ricevis 300 homojn, inkluzive de 50 infanoj kaj maljunulinoj 20 tutaĝe.
Buĝete, tiuj samlandanoj nepre bezonas 500 toltukaĵojn.
1 daŭra toltuko kostas ĉirkaŭ 10$ 10$x500= $5000

Por ebla kontribuo, bv kontakti norvege perantan amikon (oficejo@esperanto.no), Douglas Draper, kiu plusendos al la konto de la Organizaĵo.

Dankon pro via komprenemo kaj larĝa disvastigo.
Pastoro, *Mana Namutema Brinson*.